

KKPS IV – La reveno de la klaĉoj

La Klaĉ-Kunveno Post-Somera revenas al siaj radikoj! La kvara renkontiĝo, de la **28-a ĝis la 30-a de oktobro 2016**, okazos denove en Delft en la Kruithuis.




Same kiel en 2012 la renkontiĝo estos nur de NEJ kaj sen la maljunuloj de EN, kaj same kiel tiam la temo estos “Klaĉoj”. Vi havos do ankoraŭ sep monatojn por kolekti (aŭ krei) novajn klaĉojn, kaj ankoraŭ multajn ŝancojn dum printempaj kaj someraj renkontiĝoj.



Delft troviĝas meze inter la grandaj urboj de Nederlando kaj estas bone atingebla de la flughavenoj de Amsterdam, Eindhoven kaj Brussel. La renkontiĝejo troviĝas 100 metrojn for de la trajnstacio. Por tuj ekscii, kiam la aliĝilo malfermiĝas, sekvu min en Facebook ĉe

<https://www.facebook.com/klacxkunveno>



Pos-Amiko

Vintro 2015, numero 15

Pensu pri aliaj homoj, pludonu la gazeton!

INDEKSO:

1. Artefarita inteligento iĝas esperantisto
2. Partoprenantoj perdiĝas post KKPS
2. NEJ akcidente kaperas TEJO-n
3. Intervjuo kun la nova TEJO-prezidanto
3. Horoskopoj
4. EVENTOJ

KOLOFONO

Pos-Amiko estas eldonaĵo de NEJ kaj aperas kvarfoje jare.

Redaktoro: Koko Poso

kkps.klackunveno@gmail.com

[http://kkps-klacxkunveno.](http://kkps-klacxkunveno.wikidot.com/Pos-Amiko)

[wikidot.com/Pos-Amiko](http://kkps-klacxkunveno.wikidot.com/Pos-Amiko)

Artefarita inteligento iĝas esperantisto

Komputilistoj de la fama universitato MIT kreis novan artefaritan inteligenton, kiu pli bone ol ajna antaŭa softvaro imitas kaj uzas homan lingvon. Tio utilos por helpservoj, ĵurnalismo kaj ludoj, sed unue la softvaro devas esti bone testita.

La teamo de programistoj unue testis la softvaro en anglalingva medio, sed ankoraŭ tro malfacilas por ĝi la abunda uzo de slango, proverboj kaj tajperaroj. Pro tio la teamo nun unue testas en Esperanto, lingvo pli facila kaj unustila (okazas eraroj, sed ili ĉiam instigas diskuton pri gramatiko, kiun la softvaro facile rekonas). Por ne ĝeni iun utilan diskuton, la testado okazas en la reta forumo de lernu.net.

La unuaj rezultoj estas esperigaj: la AI multe pli bone regas la gramatikon ol averaĝa uzanto, ofte eniras senĉesajn diskutojn kaj ne vere atentis pri la argumentoj de aliaj uzantoj, ĉiuj tre tipaj kutimoj en la forumo.

Nun la universitato volas kunlabori kun E@I por krei roboton, kiu uzos la softvaron por ĉeesti kaj interagi en Esperanto-renkontiĝo. Por tio nur necesas krei sufiĉe rezistajn mikrofonojn, kiuj funkcios plu eĉ post laŭta parolado de Michael Boris aŭ fuŝa kantado dum karaokeo.

ANONCO

Volontuloj serĉataj por scienca esploro pri ligo inter spica manĝo kaj soifo. Interesiĝantoj anoncu sin ĉe D-ro S. Ifo.

Partoprenantoj perdiĝas post KKPS

La kvara Klaĉ-Kunveno Post-Somera estis, kompreneble, denove granda sukceso. 81 homoj kuniĝis en bela vilao en Heerlen por kune lerni, klaĉi kaj etosumi. Multaj aĝgrupoj, nacioj kaj lingvoniveloj ĉeestis, kaj en la fino malfacilis la aŭdiaŭado.



En la bildo: kreado de etoso

Tamen eĉ pli malfacila ol aŭdiado evidentiĝis esti la reveno hejmen: pro tro longa brakumado grupo de poloj maltrafis sian trajnon, kaj kaptis la sekvan. Nekomprenante la nederlandan kaj apenaŭ la germanan, ili ne sukcesis retrovi sian vojon hejmen, kaj finfine trovis sin en la mezo de Hungarujo, kiam ilia mono elĉerpiĝis.

Por travivi kaj enspezi monon por hejmvojaĝo la grupo decidis oferti siajn talentojn al la lokanoj. Bedaŭre ne estis multaj uzeblaj talentoj, krom la organizado de Esperanto-renkontiĝo, do tion ili faris en Eger.

NEJ akcidente kaperas TEJO-n

Dum KKPS en Heerlen elektiĝis finfine nova estraro de NEJ, unua paŝo al estonta mondkonkerado. Sed pro administra eraro tiu mondkonkerado iris pli rapide ol celite!

La novaj estraranoj devis esti registritaj ĉe la nederlanda komerca ĉambro, kaj diligente tion faris la sola estrarano el la iama estraro plu estranta en la nova estraro. Kaj liaaserte eraro ne troviĝis en la senditaj dokumentoj, do eraro okazis en ilia interpreto. La komerca ĉambro vidis ŝanĝon en estraro de Esperanto-asocio en Nederlando, sen detala legado supozis ke ĝi temas pri TEJO, kaj en sia sistemo ĝisdatigis la estraranojn de TEJO.

La rezulto estas, ke nun la NEJ-estraro povas fari oficialajn decidojn pri la monda asocio, sed ne pri si mem. Atendu baldaŭ anoncon, ke Partoprenu-IJK 2016 celas nur partoprenantojn, kiuj loĝas en Nederlando kaj aktivigas en sia landa sekcio.

Intervjuo: la nova prezidanto de TEJO

Ni ja konscias, ke la kalendaro de TEJO-estrarano, precipe de prezidanto, kutime tre plenas, sed ĉi-foje la Pos-Amiko sukcesis aranĝi intervjuon kun Michael Boris Mandirola, la nova prezidanto de TEJO:



P: “Saluton prezidanto, dankon pro la okazo. Unue, ĉu vi mem legas la Pos-Amikon?”

M: “JES, MI LEGAS ĈIUN NUMERON KUN GRANDA ĜUO, ĜI VERE REPRESENTAS MALOFTAN KOMBINON DE BONE VERKITA GAZETO KUN SERIOZA ĴURNALISMO.”

P: “Kiu estas viaj planoj por TEJO?”

M: “LA PLEJ URĜA KAJ GRAVA EL ILI ESTAS NIA JURA SENDEPENDINGO DE UEA. KIAM NI PLENE REGOS NIAN PROPRIAN ASOCION KAJ FINANCOJN, NI POVOS PRIORITATIGI TIUJN AFEROJN, KIUJ PLEJ GRAVAS POR NIA MEMBRARO, EKZEMPLE TEJO-KONDOMOJ EN ĈIU RENKONTIĜO.”

P: “Evidente tio gravas, ni ne volas denove perdi prezidanton pro patriĝo.”

LA HOROSKOPO

Ŝafo: Neniu zorgas pri viaj ideoj, do diru ilin laŭte al homoj en trinkejo.

Taŭro: Post reveno hejmen vi malkovros surprize aldonan najbaron.

Ĝemeloj: Vi malgajnos en konkurso, por kiu vi eĉ ne aliĝis.

Kankro: Iu amas kaj deziras vin. Sed temas pri iu nekonato en Aŭstralio.

Leono: Se vi estis bonkora en 2015, vi ricevos freŝan Pos-Amikon de avo Poso.

Virgulino: Post spica bufedo vi ne plu estos.

Pesilo: Vi prenis malĝustan trajnon pro tio vi ne legas tiun ĉi frazon.

Skorpio: Vi malkovros, ke malpli danĝeras bestaro ol estraro.

Kévin Morel-Fourrier: En 2016 konsideru stalki vin mem.

Sagitario: Provu vendi malnovajn Pos-Amikojn al via loka biblioteko.

Kaprikorno: Investu vian tutan kapitalon en akcioj de Pos-Amiko.

Akvisto: Decembro estas bona monato por krei novan religion. Ek!

Fiŝoj: Vi trafos ĉiujn matenmanĝojn de JES, sed antaŭ ekdormo.